RUSELARA ★ ESPERANTISTA ★ GRUPO

# ★ INFORMA BULTENO ★

LIGILO INTER LA GEESPERANTISTOJ DE LA RUSELARA REGIONO

№ 1

Aperos monate, tiel longtempe ol la sano de la grupkaso tion permesos. ■ Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj? Abono senpage por niaj grupanoj. Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Pk.128,10 ADRESO: STATIEDREEF, 177, ROESELARE. Tel. 215

Okt. 1932

La kortrejka "Nia Informilo" instigis nin aperigi esperantan bultenon por nia regiono. Ĝi ne estu nura presaĵo esperantlingva, sed vera ligilo inter la ruselaraj gesamideanoj. Dankvorton ni esprimas al S-ro Ger. Debrouwere, pro afabla kaj ŝiampreta kunhelpo.

---

Ni ĝojas ke la "Informa Bulteno" de niaj ruselaraj gesamideanoj ebligas al mi gratuli vin pro la rapida kaj entuziasma antaŭeniĝo de nia movado en Ruselaro. Ni ja scias al kiu ni ŝuldas tion, kaj nun estas la tasko de la anaro daŭrigi la tiel bone komencitan laboron, ne forgesante ke nuntempe por ni, Flandroj, en ĉiuj kampoj, la devizo devas esti "Forto per Unuiĝo".
Ni propagandu en konsento niajn celojn: plibeligo de la flandra kulturo, kaj subteno de la pacifista movado tutmonda. Ruselaro an taŭen kaj ĝis baldaŭ dum unu el niaj estontaj naciaj kongresoj! L.Calleens, Prezidanto F. L. E.

---

Se malgraŭ la krizo la 24a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo nombris pli ol 1300 partoprenantojn el preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo, oni certe povas diri ke la urbo allogis multe da personoj.
Oni devas laŭdi la kongreskomitaton, kiu tre bone zorgis por ke la kongreso multe efiku ĉe la neesperantista publiko. En la Norda stacidomo ĉiuj surskriboj estis tradukitaj en Esperanto, multe da francaj kaj eĉ belgaj gazetoj montris bildojn de tiaj surskriboj. En la kongresejo funkciis oficialam poŝtom kies ŝtampiloj surhavis: Kongreso de Esperanto, kompreneble ke tio faris plezuron al la kolektantoj de poŝtkartoj.
Ne nur por amuzi oni venis al Parizo, ĉar okazis ĉiutage kunvenoj, de matene ĝis vespere, eĉ kelkfoje 4 en la sama momento.
En Preĝejo Notre-Dame okazis diservo kun esperanta prediko kaj estis disdonitaj kantoj en Esperanto, tiel ke ĥore la fideluloj povis kanti "Ni volas Dion". Estis certe por la unua fojo ke en tiu belega preĝejo resonis nia lingvo. La plej bedaŭrinda fakto en internaciaj kongresoj estas la alta kotizo (175 fr.) tio fortenas multe da gesamideanoj de tiuj belaj festoj.

---

La novaj kursoj de Esperanto, donotaj en nia urbo baldaŭ rekomencas.
Propagandan kunhelpon ni ege atendas de niaj gemembroj.

---

Daŭran sendadon de tiu-ĉi bultenon ni certigas al la grupestraroj, kondiĉe ke ni ricevas de tempo al tempo komunikojn pri grupa-nacia-internacia esperanta agado.

---

En Cagnes sur Mer, Francujo, lokiĝis 30 signalfostoj kun teksto dulingva: Franca kaj en Esperanto. Ekzemple : Arrêt des autobus - Halto por aŭtobusoj. Ni memoru ke jam en du aliaj turismaj lokoj: Cannes kaj Nice ekzistas tiaj trafiksignaloj kun teksto en Esperanto apud la enlanda lingvo.

---

La loka esperantista grupo "La Estonto" en Mechelen organizas la 4an flandran kongreson de Esperanto dum la pentekostaj tagoj. Ruselaro, ne timante la krizon multnombre partoprenos.

---

Kvankam la gegrupanoj bonvole kaj regule ĉeestas la kunvenojn, ni tamen konstatas ke kelkaj -vere ne ĉiuj- ne sufiĉe sin ekzercadas.

---

La grupa biblioteko funkcios depost ni estos trovinta taŭgan lokon por lokigi la librojn, ni petas niajn gemembrojn havi iom da pacienco.

---

Dankon ni ŝuldas al S-ro Gallet pro afabla disponigo de loko en la ĉiusemajna gazeto "De Rousselaarsche Bode". En la daŭro de ok monatoj aperis 25 artikoletoj, plejmulte esperantlingve.

---

Por ke ni povus kunveni seninterrompe ĉiusemajne, ni transloĝis al nova ejo nome "Hotelo Java" Ooststraat. La salono je nia dispono belege aspektas. Menciinda estas la privata enirejo por la gegrupanoj.

---

RUSELARA ★ ESPERANTISTA ★ GRUPO

# ★ INFORMA BULTENO ★

LIGILO INTER LA GEESPERANTISTOJ DE LA RUSELARA REGIONO

№ 2

Aperos monate, tiel longtempe ol la sano de la grupkaso tion permesos. ■ Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj? Abono senpage por niaj grupanoj. Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

HON. BRAEKEVELT
ADRESO : STATIEDREEF, 177, ROESELARE.

NOV. 1932

La Meĥlenaj Samideanoj al siaj amikoj de la R.E.G.
Kiel Vi jam scias okazas la 4-a Flandra Kongreso de Esperanto je Pentekosto en nia urbo.
Ni esperas vidi Vin kiel eble plej multnombre kaj ni faros ĉion eble por kontentigi Vin kaj fari la restadon agrabla kaj interesa.




La provizora programo enhavas interalie kantvesperon,balon, sonorilarkoncerton,teatran ludadon,festmanĝadon... kaj tre originalan piedpilkludon...Ni organizos ekspozicion de ĉiuspecaj esperantistaĵoj.
Meĥleno estas tre antikva flandra urbo, kiu eĉ dum kelkaj jaroj, kiam Margareto de Aŭstrio loĝis tie, estis la ĉefurbo de la Nederlandoj, ĉar tie ĉi kunvenis la granda Konsilantaro.
En Meĥleno Vi vidos multajn antikvajn preĝejojn kaj interesajn urbajn kvartalojn. Vi vidos interalie la turon de la lunbrulado,sur kiu Vi aŭdos la gajajn flandrajn kantojn,ludatajn sur la sonorilaro.
Baldaŭ ni transdonos la aliĝilojn, kaj ni esperas sincere ke la R.E.G.estos plejmulte reprezentata en nia urbo.Gis la gajaj Pentekostaj tagoj.
"La Estonto" Mechelen.

---

Belajn propagandglumarkojn por la 4-a Flandra kongreso en Mechelen estas eldonitaj kaj estas haveblaj ĉe la estraro de la R.E.G. je la prezo de I.40 f. po folio de 20 markoj.

---

La "Praktiko", monate aperanta ekzerca gazeto de la Internacia Cseh-Instituto en Den Haag publikigis celtrafan ĉefartikolon pri "Dumvivaj Komencantoj" kun kies enhavo la membroj konatiĝis... Ni rememorigas al la membroj ke la dato de ilia esperantistiĝo estas la I7-an de januaro I932.- Restas do nur ĉirkaŭ 3 monatoj por..."balbuti"...poste...

---

Nia biblioteko finfine ekfunkciis; ĉirkaŭ 25 libroj estas je la dispono de la membroj. Inter ili sin trovas 4 binditaj jarkolektoj de la revuo "Esperanto" de U.E.A., 3 jarkolektoj de la revuo "Flandra Esperantisto",kaj pluaj interesaj legolibroj... Okazon por pliperfektiĝi Vi havas, kaptu ĝin.

---

Por nia biblioteko.- S-ro Joseph Decoster el Bruĝo, nia lerta parolinto de la pasinta jaro, kiu tre simpatias je nia grupo, pliriĉigis nian grupan bibliotekon, donacinte al ĝi belan esperantan legolibron.
F-ino Josée Lagae donacis,kiel biblioteka subteno : IO fr. - H.B. IO fr.
Al la donacintoj nian sinceran dankon !
Kiu plilongigos la liston de tiuj imitindaj ekzemploj ???

---

Dimanĉon, la 20-an de tiu monato okazos la malfermo de la novaj kursoj de Esperanto. Kiel pasintan jaron, estas S-ro Ger.Debrouwere el Kortrijk, kiu faros paroladon kun provleciono. Ciu membro certe volos ĉeesti tiun interesan priparoladon, kaj nepre devus alkonduki almenaŭ du, eĉ pli (!) novajn interesulojn. Ĉar ni travivas nun krizan tempon, la kotizo por la kursoj estas nur IO frankojn, lernolibro enkalkulita ! (Senpagaj por la gemembroj).
Kompreneble ke la parolado estas tute senpaga ! kaj ke ĝia celo estas enkonduki la novajn kursoj, donotajn de S-ro Henri Braekevelt.

---

La nova membro de nia grupo S-ro André Martin bonvole prezentis sian kunhelpon al la grupo, niaflanke, ni rekomendas lin al la membroj por ĉiuspecaj presaĵoj, artaj kaj ordinaraj, Do, por siaj presaĵoj la membroj sin direktas Hugo Verrieststraat, 65, kaj sendas tien amikojn kaj konatulojn.

---

Wien kaj Niederösterreich. - Belan faldprospekton pri la Aŭstria ĉefurbo kaj la apuda provinco, oni povas ricevi senpage skribante al "Fremdenverkehrs-Kommission der Bundesländer Wien kaj Niederösterreich, Messpalast, Wien VII."

---

**informa bulteno**

**ruselara esperantista grupo**

**ligilo inter la esperantistoj de la ruselara regiono**
**statiedreef, 177, roeselare**

januaro I934 n° I3 eldonnombro IOO

La estraro prezentas al la membroj kaj simpatiantoj de la grupo la plej sincerajn bondezirojn por la jaro I934.

---

Bijzondere mededeeling. De eerstvolgende vergadering der groep wordt gehouden op

Maandag 8 januari, om 7 I/2 u. in hotel Java.

-----(dus niet Vrijdag zooals werd meegedeeld)

Op de dagorde stellen wij:

I) overzicht kastoestand einde jaar;
2) mededeelingen en bespreking over de bestuursverkiezing (om reden van het belang dezer vergadering dringen we aan opdat alle leden naar de vergadering van Maandag, I5 januari zouden opkomen.

---

In al de groepen werd een klein propaganda-kalender verspreid, uitgegeven door de Flandra Ligo Esperantista. Wie tans nog geen ekzemplaar bezit kan dit bekomen in de eerstvolgende vergadering der groep.

Opnieuw willen we de aandacht vestigen op de noodzakelijkheid zich in het bezit te stellen van regelmatige esperanto lektuur. Benevens leerboek, groepvergaderingen en briefwisseling behoeft ieder vooruitstrevend lid in te schrijven op een esperanto revue.
Een eerste daad van samenwerking met de leiders onzer beweging in Vlaanderen, is wel een inschrijving op Flandra Esperantisto. We dringen aan bij de leden een persoonlijke aktie te voeren, voor dit orgaan.
I/2 jaar-abonnement n° 7 tot I2 prijs 7.50 fr.

Het best gedocumenteerde universeel maandblad is de uitgave van de Universala Esperanto Asocio, Geneve.

| | | |
|---|---|---|
| U ontvangt: | I2 maandnummers ......... | 2I0 bl.tekst |
| | uit te kiezen premie..........ongeveer | 200 bl.tekst |
| | het prachtige jaarboek, adressen uit a l l e landen ................ | 450 bl. tekst |
| Slechts 40.oo fr. | | 860 bl. |

---

Dimanĉon, 2Ian de januaro. Jam de nun ni atentigas la ge-Reg-anojn je tiu dato, ĉar ni deziras multnombran partoprenon al la festo organizata de la kortrejka grupo esperantista. La alveturo okazos per la vagonaro, posttagmeze. Detalojn ni komunikos je tempo konvena.

---

Dimanĉon, IIan de februaro. LA FESTO DE LA RUSELARA ESPERANTISTA GRUPO
( n.b. Esperantistenfeest v.verleden jaar. Beste referenties van welgelukken bij de talrijke deelnemers.
TIUN TAGON VI NEPRE REZERVU POR NIA SAMIDEANA FESTO.....................

---

Nieuwe schikking.

Teneinde alle esperantisten in de gelegenheid te stellen, aktief deel te nemen aan onze werking zal de eerste vergadering van elke maand ingericht worden als

a l g e m e e n e v o r g a d e r i n g

Daardoor zullen denkelijk een aantal leden, thans weerhouden uit de wekelijksche vergaderingen, de gelegenheid vinden, ten minste elke maand één esperanto vergadering te kunnen bijwonen.
Het bestuur zorgt er natuurlijk voor dat alle belangrijke mededeelingen en schikkingen in deze vergadering bekend gemaakt worden.

--------------------------- R.e.g.-ano vi estu ---------------------------

*